

Vojaĝraporto

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1987 decembro 17

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1988-004/SRI-1988-004-A-3-Claude-kaj-Andree-GACOND-Vojaghraporto-konvinkiga-por-la-esperantistoj-de-1903.mp3>

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia.

Enirante la duan jarcenton de sia lingvo multaj esperantistoj sentas la bezonon studi, kiel la zamenhofa lingvo ekdisvastiĝis. Dum prelegaro, ĉerpante el raportoj de la revuo Svisa Espero, ni prezentas al vi historieton de la disvolviĝo de esperanto en Svislando.

A.- En 1903, kiam esperanto ekdisvastiĝis en Svislando, multaj adeptoj de la lingvo de Zamenhof konservis en si mem dubojn. Ili ne povis imagi, ke lingvo tiel rapide lernebla permesas vere interkompreniĝi kun fremduloj.

Cl.- Ankoraŭ nun multaj esperanto-komencantoj havas similajn dubojn. Nur personaj eksperimentoj ilin forigas.

A.- Okaze de la unua kunveno de Svisa Esperanto-Societo, kiu okazis en Rolle, urbeto situanta ĉe lago Lemano inter Lausanne kaj Ĝenevo, la 27-an de septembro 1903, la neŭŝatelano Jean Borel, vicprezidanto de Svisa Esperanto-Societo, raportis, kiel diras Svisa Espero N° 5, "en eleganta Esperanto" pri la ĵusa vojaĝo en Varsovio, "kie li restis kelkajn horojn, ĉe D-ro Zamenhof, kies modesteco kaj amindeco lin ravis."

Cl.- Artikolo dulingva, titolita **Spertoj vojaĝaj** kaj en la franca **Expériences de voyage**, aperis en Svisa Espero N° 4. Ĝi povas doni ideon pri la tiama intereso de la esperantistoj. En ĝi Jean Borel provas komprenigi, ke esperanto estas la solvo, kiun la glora Leibnitz tiel longe serĉadis.

A.- Ni legigas al vi tiun propagandecan artikolon, kiu tutcerte kuraĝigis multajn svisojn ellerni la zamenhofan lingvon. Ni ne forgesu, ke ĝi estis skribita en aŭgusto 1903, du jarojn antaŭ la unua Universala Kongreso de Esperanto, en epoko kiam oni rajtis havi multajn dubojn pri la taŭgeco de esperanto.

Cl.- Ni legas tiun artikolon sen korekti la gramatikajn kaj stilajn erarojn, tio por respekti la historiecon de la dokumento. Vi ekzemple rimarkos, se vi atente aŭskultos, ke Jean Borel, sub la influo de la franca lingvo, uzas duoblan negacion, dirante **ne ... nek, nek ...**, anstataŭ nur **nek ... nek ...**. Sed, malgraŭ tiuj eraretoj tipe komencantecaj, vi rimarkos, ke Jean Borel, kiu poste fariĝis dinamika eldonisto en Berlino, jam estis sufiĉe lerta esperantisto.

A.- Ĝen ni citadas parton el tiu okpaĝa artikolo:

"Oni diras komune ke sufiĉas scii anglan, francan, germanan, hispanan lingvojn por kompreniĝi ĉie en la mondo. Tute bone, se oni ne eliras el grandaj internaciaj vojoj, el ĉefaj urboj, el grandaj hoteloj, kaj eĉ ... Sed nun, kiam la rilatoj inter la nacioj fariĝas ĉiujare pli oftaj, ne plu kvar aŭ kvin lingvojn oni devas koni, sed ok, dek kaj pli.

"Mi ĵus akiris tiun malagrablan sperton, vidante ke malgraŭ la tempo kaj ĉiuj penadoj oferitaj al la lernado de kvar aŭ kvin lingvoj, mi fariĝas surda kaj muta antaŭ Rusoj, Poloj,

Bohemoj, Hungaroj, Serboj. Certe germana, franca kaj itala lingvoj tre profitis al mi, sed kiel ofte mi bedaŭris la nekonon de slavaj idiomoj.

Cl.- "Kiel ofte ankaŭ mi ekkriis, daŭrigas Jean BOREL: kiam do helpa lingvo, la sama por ĉiuj ĝeneraligis, krom la naciaj?"

"Tamen se ni ne estas ankoraŭ en tia situacio, ni ne malesperu, ĉar ni kviete tien iras. La helpa lingvo estas necesaĵo, kies urĝeco vidiĝas ĉiam pli kaj pli; ĝi devas iam venki. Mia ĵusa vojaĝo svenigis miajn lastajn dubojn pri tio, ĉar mi povis konstati ke Esperanto estas perfekte kontentiga solvo de 1^a problemo.

"Unu el la grandaj argumentoj kiujn oni aŭdas kontraŭ la principo de 1^a neŭtrala lingvo estas ke ĉiu popolo ĝin elparolos siamaniere, kiel okazas ĉe la latina, kaj ke sekve diversaj popoloj ne povos interkompreniĝi.

A.-"Nu ! kaj mi estas feliĉa tion laŭte diri, miavice, post multaj vojaĝantoj, tiuj teorioj estas tute falsaj koncerne Esperanton; ĉie kie mi pasis, mi trovis kolegojn esperantistajn, ĉiuaĝajn, ĉiusituaciajn, mi vidis scienculojn kaj malklerulojn, profesorojn kaj laboristojn, en Germanujo, en Rusujo, en Aŭstrujo kaj en Hungarujo. Kun ĉiuj mi povis tuj kunparoladi Esperante kun facileco kiu min mem mirigis kaj ravis.

Cl.- "Mi ne konas nek rusan, nek polan, nek hungaran, nek boheman, nek svedan lingvojn, kaj mi babilis en Varsovio kun Poloj kaj Rusoj, en Brno kun Bohemoj, en Budapeŝto kun Hungaroj kaj unu Svedo. Multaj el ili sciis nur la gepatran lingvon kaj Esperanton, kaj ni kune havis pri ĉiuj temoj konversaciojn daŭrajn kaj interesajn. La plejmulto, kiel mi, lernis Esperanton solaj sen helpo de instruisto, kun malgranda gramatiko, kaj ĉiuj havis identan kaj tute korektan elparoladon.

A.- "Povas ekzisti malgrandaj diferencoj en la maniero elparoladi kelkajn literojn ekzemple "r", kiun unuj "ruligas" kaj kiun aliaj "kartaVas"; sed tio tute ne malhelpas la kompreniĝon ...

"Oni rimarkos ke miaj ĵusaj vojaĝaj spertoj tute akordiĝas kun tiuj de 1^a aliaj esperantistoj kiuj vizitis samideanojn en diversaj partoj de 1^a mondo. Ni povas ankoraŭ unu fojon plie konkludi ke Esperanto estas akirebla por ĉiuj popoloj kun preskaŭ sama facileco, kaj ke tiu genia internacia lingvo, kiun la glora Leibnitz tiel longatempe serĉis fariĝis realaĵo.

Cl.- Jean Borel finas sian artikolon per tiu frazo:

"Tiu mirinda ilo estas en niaj manoj; ni ĝin lerte uzu kaj konigu."

A.- Sendube multajn legantojn, kaj en Rolle aŭdantojn, konvinkis Jean Borel. En la jaroj 1904-191 multiĝos en Svislando la lertaj uzantoj de tiu "mirinda ilo". Pri tiu kresko de esperanto en Svislando ni raportos en venontaj elsendoj.

Cl.- Kaj nun en la restanta minuto, por revenigi vin en la nunan tempon, ni aŭdigas kanzonon de Flavio Fonseca, brazilano.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée GACOND diras al vi: Ĝis reaŭdo!